Alessandria 1, Ancona 1, Bologna 2, Bolzano 1, Bordighera 1, Brescia 17, Cagliari 2, Canicatti 1, Castiglioncello 9, Catania 2, Civitavecchia 1, Cosenza 1, Cremona gruppo, Firenze 2, Genova 4, La Spezia..., Livorno 22, Mascioni 1, Mantova 13, Milano 16, Modica 1, Montralvi 1, Napoli 1, Novara 5, Ottniano 29, Padova, Camera di Commercio, Palermo 2, Parma gruppo, Piacenza gruppo, Pisa 1, Potenza 12, Reggio C. 1, Roma 29, Rovereto 2, S. Giov. Valdarno 1, S. Vito 1, Sestri Levante 1, Signa 1, Torino 11, Trento 25, Trieste 1, Udine gruppo, Venezia 1, Verona 11, Voghera 67.

Quando si pensa che a Genova, a Torino, a Milano, a Bari, a Bologna in quei fortissimi nuclei di popolazione e dove pure il movimento esperantista è sensibile — o lo fu — la Federazione conta per le cifre su indicate, c'è da sentir vacillare la fede, e gli appelli alla buona volontà dei pochi per destare i moltissimi non possono mai essere superflui.

Bisogna che tutti si persuadano che solo l'unione fa la forza, che solo la massa e il numero ci possono fare ascoltare, nello interesse della diffusione di uno studio che sarà tanto più utile alla nostra patria ed alla umanità quanto più sarà esteso.

Il Presidente della F. E. I.
Generale Carlo Cordero di Montezemolo

Congresso Universale di Edimburgo (31-7). — Nel 2° Bollettino figurano fra gli scienziati designati per conferenze i nostri sa-

mideani Ing. Oregò e Dott. Stromboli. Prosegue la raccolta di fondi per l'intervento dei ciechi.

Presso la F. E. I. possono ritirarsi i moduli per le adesioni.

Convoglio Nazionale a Livorno (19-20 Settembre). — La Cattedra indirà per il congresso una sessione nazionale di esami di grado superiore e manifestazioni culturali.

La quota personale di partecipazione è stata stabilita in lire venti.

Si prega di inviare sin d'ora le adesioni che saranno pubblicate nel prossimo numero della Rivista.

Schedario. — Il Direttorio ha stabilito di formare uno schedario degli aderenti distinto per professione o studio. Gli aderenti isolati ed i Capi Gruppo sono pregati inviare le schede (formato cartolina) indicando in testa professione o studio, poi cognome, nome, indirizzo, associazioni tecniche, sportive e culturali di cui si è soci, riassunto della propria opera nel campo esperantista. Proposte. Firma. Si prega di unire le schede anche dei benemeriti del movimento locale con loro note biografiche, anche se assenti o defunti. Il rievocare chi ha lavorato ispira benefiche energie.

Itala Revuo. — Tenere presente che per risparmio di tempo e di posta tutte le comunicazioni di ricevuta, di adesioni e di particolari che riguardano il movimento esperantista sono date per mezzo della *Itala Esperanta Revuo* edita dal samideano A. Paolet, ed è interesse di tutti che tale pubblicazione (che onora l'Italia anche all'estero) si mantenga da sé per il numero degli abbonamenti. Il Direttorio considererà come versate alla F. E. I. le somme che Gruppi o samideani invieranno per abbonare ad essa (almeno per un primo anno) circoli di cultura, istituti di istruzione e personalità che è bene seguano il nostro lavoro.

Radiofonia. — Per corrispondere a richiesta del Comitato Centrale del Movimento Esperantista, si pregano i Gruppi e soci di località ove esistono stazioni radiofoniche di riferire circa i passi fatti per inserire lezioni e declamazioni in Esperanto.

III. Nota di adesioni per il 1926

(Dal 28 Gennaio al 14 Febbraio 1926)

	F. E. I.	I. E. R.	U. E. F.
Prof. Merli Luisa, Piacenza	10	—	—
Polizzi Giuseppe, Catania	10	—	—
Prof. Arabeno Michele, Genova	10	—	—
Signa Segrè Vittoria, id.	10	10	—
Prof. Ricca Cosmo, id.	10	—	—
Signa Lina Corti, Livorno	3	—	—
Rag. Pietro Torre, Genova	10	10	30
Rev. Ravanelli P. Silvio, Verona	5	—	—
Prof. Toschi n. u. Umberto, Bologna	5	—	—
Pietro Luise, Potenza	5	10	30
Bochiechio Giovanni, Potenza	—	—	30
Gruppo Esperantista, Parma	10	10	30
Camera di Commercio, Padova	100	—	—
F. E. I. a favore di detto Ente	—	10	—
Caico Federico, Palermo	10	10	—
Esperanta Grupo, Cromona	100	50	50
oltre L. 50 per Cattedra.			
Rangone Francesco, Voghera	—	10	—
Remotti Secondo, Voghera	—	10	—
Can. Pietro Favacchio, Modica	6	10	—
Esperanta Grupo di Udine (di 53 soci)	50	200	210
Cavagna Mario, Udine	15	10	—
Prof. Migliorini Bruno, Roma	5	10	12
Dott. Migliorini Elio, id.	5	10	30
Com. Meccheri Egidio, id.	5	10	—
Dott. Piscini Urbano, id.	5	10	30
Com. Barberi Francesco, id.	5	10	—
Giacinta Fabbri, id.	5	10	—
Cap. Bilotti Cesare, id.	5	10	—
Ing. Riem Roberto, id.	5	10	30
Liverani Francesco, id.	5	10	—
Natalucci Agnese, id.	5	10	—
Andreola Amina, id.	5	10	—
Rosa Giuseppe Maria, id.	5	10	—
Rag. Trombetti Mario, id.	5	10	—
Prof. Antonelli Adelaide, id.	5	10	30
Prof. Pioppa Pietro, id.	5	10	30
Ing. Vanghetti Uberto, id.	5	10	—
Rag. Filippi Ermanno (seconda quota) id.	5	10	30
Leonardi Leonardo, id.	5	10	—
Dott. Sabelli Ettore, id.	5	10	—
Palma Giuseppe, id.	5	10	—
Porta Druso, id.	5	10	—
Prof. Arch. Di Demetrio Francesco, id.	5	10	12
Prof. Signorini Giuseppe, Firenze	2	10	—
Prof. Borrello Luigi, Palermo	10	—	—
Prof. Fratanni Luigi, id.	10	—	—
Catarzi Gino, Signa	4	10	30
Torri Giuseppe, Brescia	5	—	—
Orlandini Bice, id.	5	—	—
Billet Guido, Stenografo. - Ufficio Spec. Minis. Interni, Roma	10	10	30

Aderite alla Federazione Esperantista Italiana

PASKO EN ITALIO

Diferenco de moroj kaj kutimoj en la diversaj partoj de Italio. — Ĉiu parto de Italio havas ion diferencon je la aliaj pri la moroj kaj kutimoj, pri la solenado de la festoj, pri ĉio, kio estas montrado de la popola vivo. Rimarkindajn diferencojn oni povas konstati eĉ en vilaĝoj, burgoj kaj urboj inter ili tre proksimaj.

Ĉiuj mallongaj sciigoj pri Pasko en Italio koncernas en speciala maniero Marklandon.¹⁾

La Sankta Semajno. — La Sankta Semajno, kiel ĉiuj kristancj scias, antaŭiras la Dimanĉon de Pasko; la tagoj, kiuj ĝin konsistigas, estas dirataj Sanktaj; ĝi komenciĝas de la Sanktan Lundon. Dum tiu semajno oni solenas serion da ceremonioj por memori kaj glori la pasion, la morton, la revivigon de Kristo.

Pri ĉiuj ceremonioj kaj pri ĉiuj popolaj moroj ilin koncernantaj mi nun diros malmultajn vortojn.

Dimanĉo de la Palmoj. — Dum la dimanĉo, kiu antaŭiras la Sanktan Lundon, la kristanoj rememoras la eniron de Kristo en Jerusalemon. Tiu dimanĉo estas dirata de la Palmoj ĉar en ĝi la popolo, tenante en manoj branĉetojn de palmoj kaj de olivoj, glore akceptis la humilan Filon de la lignajsto de Nazareto predikantan la novan vorton de justeco, de amo, de paco.

Por rememori tiun fakton la eklezio starigis tiun feston, dum kiu oni faras la Procesion kaj la Benon dirataj de la Palmoj.

La Procesio kaj la Beno de la Palmoj. — En ĉi-tiu Procesio malrapide antaŭiras kredanto en la vesto de la kunfrataro, al kiu li apartenas, subtenante altan krucifikson. Postvenas, psalmokantante, la pastroj en siaj vestoj, la religiaj asocioj, ĉu virinaj, ĉu viraj, kun standardoj, kaj duobla vico de fratoj en siaj surtutoj, ordinare blankaj, kovrataj

1) « Marklando » : itale: « Marca », aŭ, plurombre « Marche » (pron.: Marka, Marche): regiono kosanta en Centro-Italio, laŭlonge de la adriatika marbordo. Ĝi enhavas la kvar provincojn de Pesaro (pron.: Pésaro) kaj Urbino, Ancona (it.: Ancona; pr. Ankona), Macerata (pr. Maĉerata) kaj Ascoli (pr. Askoli). Ĉefurbo: Ankona.

ĉe la supra parto per silka manteleto de diferenca koloro, laŭ la diferencaj kunfrataroj. Komence de ĉiu kunfrataro estas frato subtenanta la flagon de sia religia societo; sur tiu flago estas pentrita ikono. Ĉiu el la postvenantaj kunfratoj tenas en mano brulantan kandelon, kaj diradas laŭ monotona ritmo siajn preĝojn.

Postvenas la popolamaso, ankaŭ ĝi preĝanta, dividata en du grupoj: la virinoj kune kun la infanoj, antaŭe, kaj la viroj, sen ĉapelo, poste. Inter la du grupoj estas la « Mazziere »²⁾, ano de kunfrataro, portanta grandan, argentitan bastonon: li devas kunagi por la ordo de la Procesio, kaj zorgi, ke la diritaj du grupoj restu disigitaj.

La Procesio trairas la vojon, aŭ iujn ĉefajn vojojn de la loko, kaj fine reeniras la preĝejon el kie ĝi foriris, kaj tie la branĉetoj de olivo estas benataj kaj disdonataj al la pastroj kaj al la popolo; ĉiuj poste ilin alportas domon, kie plejofte ili estas konservataj sur la ikonoj, ilin fiksante tiamaniere, ke la branĉeto elstaru de inter la kadro kaj la muro.

Dum la beno de la Palmoj la horo de la ĉeestantoj kantas jeĥan antifonon:

« La infanoj de la Hebreoj, portante olivbranĉetojn, iris renkonte al Sinjoro kriante kaj dirante: Hosanon en la plej alta ĉielo!

« La filoj de la Hebreoj sternis siajn vestojn sur la stratoj kaj kriadis: Hosanon al la Filo de Davido: Benata tiu, kiu venas je la nomo de l' Sinjoro! »

Oni solenas la meson, kaj post ĝia fino, la popolamaso disiras tra la stratojn, tenante en mano sian benitan branĉeton.

Eksterordinara purigo de la domoj. — En la tagoj antaŭirantaj la Sanktan Semajnon oni faras en ĉiuj domoj eksterordinaran purigon: kaj tiun purigon oni faras ne malpli en la domoj de la malriĉuloj ol en tiuj de la riĉuloj: tiuj estas tagoj fatalaj por la mizeraj araneoj, kies plej kaŝitaj toloj estas malkovrataj kaj detruataj.

2) « Mazziere » (pr. maĉjera): vorto signifanta: Homo je la granda bastono.

La ovo simbolo de Pasko. — Dum la Sankta Semajno, kaj en la tagoj antaŭ kaj post ĝi, en la montrosrankoj de la papervendejoj estas elmetataj ilustritaj bondeziraj poŝtkartoj de la plej diferencaj kaj ĉarmaj formoj, plurkoloraj, argentinaj, oritaj, el kiuj la ĉefa figuro estas ĉiam tiu de la ovo: ovoj ĉirkaŭitaj de floroj, ovoj ligitaj per belaj rubandoj sur la dorso de cikonio aŭ de kateto, kiuj ilin portas kiel dusako, kaj bildoj de ridetantaj infanetoj starigantaj kolosan ovon, pli alta ol la plej alta el ili. La arto en mil strangetaj, geniaj manieroj prezentas ĉitium simplan simbolon de Pasko.

En la montrosrankoj de la kafejoj kaj de la dolĉajvendejoj estas elmetitaj elegantaj bombonujoj en formo de ovo, kaj apud tiuj bombonujoj oni vidas sukerajn, ĉokoladajn ovojn, de la etetaj dimensioj de tiuj kolombaj ĝis tiuj kolosaj, atingantaj, kaj foje superantaj la alton de metro, beligitajn per plurkoloraj, logaj elstarajoj prezentantaj rubandojn, foliojn, florojn, papiliojn, birdetojn, k.t.p...

Knaba ludo faradata per solidigitaj ovoj. — Speciala ludo estas tiu, kiun dum la Sankta Semajno, kaj precipe la tagon Paskon, la knaboj faras per solidigitaj ovoj.

El du knaboj, havantaj ĉiu unu el ili, la sorto decidas kiu devas subteni en mano, ĝin tenante vertikale, kun la plej eta parto (*pinto*) supren, la sian. La alia knabo frapetas per la pinto de sia ovo sur la pinton de tiu substara de la alia knabo, kaj tiu el la du junuletoj, la ŝelo de kies ovo rompiĝas, malgajnas duone la ludon.

Tiu el la du, kiu antaŭe frapetis sur la pinton de la ovo de la alia, tenas nun la sian kun la plejgranda parto (*bazo*) supredirektata, kaj sur ĝin la alia knabo frapetas per la bazo de sia ovo.

Se la ovo, kiu antaŭe cedis ĉe la pinto, restas nerompita ĉe la bazo, la ludo estas *sama*, nome neniu el la du ludantoj venkas aŭ malvenkas; se, kontraŭe, la ovo, kiu komence havis sian pinton rompitan, cedas ankaŭ ĉe la parto de la bazo, tiu el la du knaboj, kiu ĝin pose-

dis, malvenkas, kaj lia ovo, *vundita ĉe ambaŭ la partoj*, iĝas trofea propraĵo de la alia knabo.

Kvankam en maloftaj okazoj, trompoŝtelo aperas ankaŭ en tiu ludo de la *eta mondo*, kiam al tro simpla knabo ruza bubo sin prezentas armita de ovo... el alabastro. Sed foje, en similaj okazoj, la komedio iĝas tragedieto, ĉar la ŝultroj de la frumatura trompisto farigas celtabulo de frapado je pugnoj.

Solidigitaj ovoj kolorigitaj kaj desegnitaj. — La solidigitajn ovojn, ĉu destinitajn por la dirita ludo, ĉu ne, ofte oni tinkturas je diversaj koloroj ilin kuirante en kolorigita akvo: ili estas ankaŭ plibeligitaj en tre simpla maniero. Antaŭ ilin mergi en bolantan kolorigitan akvon oni faligas sur ilin gutojn de fandita vakso, uzante preĝejajn kandelojn, ne stearinajn. Kiam la ovo estas kuirita oni forlevas tiun vakson, kaj ĉe la tinkturigita surfaco de la ovo, en la loko de ĉiu guto de forlevita vakso oni vidas blankan rondeton.

Se sur tiu malmoliginta guto de vakso oni faris antaŭ la kuro de la ovo per ŝtala pinto strekojn prezentantaj steletojn, florojn, vizajojn, k. c..., tiamaniere, ke la metala pinto tuŝu sur la suba ŝelo, oni vidas anstataŭ simplaj, blankaj rondetoj, ĉarajn stelojn, florojn, vizajojn, k. c....

Oni vidas ankaŭ (sed malofte) solidigitajn ovojn artisme desegnitajn, kaj mi dirus, skrapopentritajn; por ilin ricevi oni kuras antaŭe la ovon, donante al ĝi tre malhelan tinkturon, kiu povas esti eĉ nigra; per ŝtala pinto oni skrapas la surfakon de la ovo tiamaniere, ke ĉe la malapero de la subtila tinkturigita tavolo, la gratigitaj partoj iĝas blankaj, brilante sur la malbela fono, kaj prezentante ĉarmetajn bildojn de bestoj, homoj, floroj, pejzaĝoj, k. c....

(Daŭrigota)

A. Mazzolini

È dovere di ogni Esperantista Italiano sostenere l' I. E. R. che ha il nobile scopo di far conoscere l' Italia all' Estero.

DU KRISTO-LEGENDOJ

LA HIRUNDOJ.

En Judlando, en la sunoplana kamparo de Nazaret, dia Infano, ornamita per longaj, blondaj haroj, sidante sur bordo de rivereto, ludetis kune kun kelkaj samaĝaj kamaradoj: per siaj manetoj li knedis kreton, el kiu li formis graciajn birdetojn kun malfermitajflugiloj, kiujn li metis ĉe unu flanko.

Parizeo pasis tie: « Filo de P' peko, li kriis, kion vi faras, hodiaŭ, dum la Sankta Sabato? ». Kaj brute, per piedfrapo, li provis dispremi la birdetojn. Sed la infano Jezuo, per kunfrapo de siaj manetoj, vivigis tiujn kretajojn, kiuj eklevigis en la aeron kaj disflugis for.

Tiamaniere naskigis la hirundojn.

Per siaj cindrokolorajflugiloj, ili rifuĝis sub la tegmento de P' domo kie loĝis Jezuo, kaj, el tiu sama kreto el kiu ili estis formitaj, ili konstruis siajn nestojn. Kaj, de tiam, ĉiutempe la hirundo rifuĝis sian familieton ĉe la domo de P' homo, kies amikeco ĝi faris. Kaj de tiam la hirundoj tie vivis liberaj, netuŝitaj, amataj. La popolgento eĉ vidas en ili mesaĝerojn bondezirantajn feliĉon!

Post multe da jaroj, kiam la blondbukle riĉa infano farigis homo kaj por la savo de P' homo gento aliris la Golgoton, la korprenitaj hirundoj sekvis Lin disjettante en la aeron sian doloran trilon.

La Majstro estis je Sia fino, sur la Kruco: sur Lia vizago, kune kun Liaj larmoj, elruis sangogutoj. Tiam la hirundoj, unu post la alia, deprenis de P' krono ĉirkaŭanta Lin frunton, ĉiujn dornojn.

La tago venis al sia fino.

Per lasta sopiro Jezuo redonis al la Patro sian animon.

La ĉielo malheligis, la tero eltremis, kaj laflugiloj de P' hirundoj kovrigis per la koloro de P' funebro kaj ĝin konservos ĝis la fino de P' mondo.

LA RUĜGORĜO.

La gracia ruĝgorĝo plezurigis per sia kanto Judlandon en la epoko de P' Pasko de Jezuo. Dum la mateno de tiu fatala tago, Jezuo, forlasita de la Siaj kaj malĝoja, supreniris la krutan vojdon de P' Golgota, subpremita de P' peza ligna kruco. Neatendite, facilmovi, elegantforma birdeto, kun tre viveca rigardo, ekflugetis ĉirkaŭe de Jezuo kaj de Liaj ekzekutistoj. La birdeto rememoris ke ian tagon la Savinto nutris lin per kelkaj eroj da mangajo kaj korĉanka por sia Bonfaranto, akompanis Lin dum Lia dolora vojiro.

Kiam Jezuo atingis la supron de P' Kalvario, la birdeto haltis iom malproksime de P' kruco, sur artetaĵo de hisopo, kaj de tie ĝi ĉeestis la sangan turmenton de P' Filo de Dio.

Subite la estingiganta rigardo de Jezuo haltis sur la delikata birdeto kaj Liaj lipoj, per mallaŭta, dolĉa voĉo murmuretis kelkajn vortojn: « Benon al vi, kiu ne forlasis min ».

La gracia birdo sentis la dian benon kaj, malfermante siajn etajnflugilojn, aliris la lignan krucon surversita de sanga roso kaj haltinte sur la kapo de Jezuo, dolĉmove detiris per sia beketo unu el la longaj dornoj. Poste ĝi rapide forflugis, kunportante for, en sia beko, sian trezoron.

En tiu momento efektiviĝis la superrava mistero de P' homo savo per la morto de P' Homo-Dio.

....Guteto da sango de Jezuo de P' akrepinta dorno falis sur la brustplumojn de la ruĝgorĝeto, ilin makulante per sanga postsigno.

Jen pro kio, laŭ la legendo, la ruĝa surbrusta makuleto de P' gentila birdeto, ripetiginte, generacion post generacio, donis al pluma eta kreitaĵo la nomon de ruĝgorĝo.

El la itala: Teo H. Rok'

Unuaranga kaj rekomendinda restadejo por Esperantistoj. - Tute renovigita dum 1925. - Trankvila kaj urbocentre lokata. - Moderna Komforto. - Ĉiu ĉambro kun fluanta akvo. - Esperanta servisto ĉe la fervoja stacidomo. - MODERAJ PREZOJ. En- kaj elŝipigejo S-ta Zaccaria

Hotelo kaj Pensiono
"MINERVA"
... VENEZIA ...

SCIENCO KAJ VIVO

La balono de Napoleono I.

Unu el la plej belaj el la festoj faritaj en Parizo, okaze de la kronado de Napoleono I, estis belega aerbalono, tute ornamita per silkaj drapoj, kun unu aglo sube, kaj kun imperia krono konsistanta el 3000 koloraj vitroj: ĝi kostis 23.500 frankojn.

Ĝi estis suprenlevita la 16-an de decembro 1804, je la dekunua vespere, el la vestiblo de *Notre Dame*, dum la tuta Parizanaro, festanta, aplaudis. Transportita de la vento dum malmultaj horoj, la balono alvenis en Italujon kaj ĝi ekfalas, je la vesperiĝo de la 17-a de decembro, en *Anguillara Sabazia* sur la lago de *Bracciano* apud Romo, post esti tuŝinta kelkfoje teron kaj post esti ektuŝeginta la supozitan tombon de Nerono, sur la vojo *Cassia*, kie ĝi lasis parton de la imperia krono.

Oni rakontas ke, kiam Napoleono eksciis tiun ĉi lastan detalon pri la vojaĝo de l' aerbalono, li restis maltrankvila vidante en tio, per sia superstiĉa animo, fatalan signon; kaj oni diras ankaŭ ke Napoleono plu ne volis, pro ĉi tiu fakto, ion aŭdi pri aeronautiko.

Malmultaj personoj scias ke tiu ĉi fama balono de Parizo ankoraŭ ekzistas kaj ke ĝi troviĝas, bone konservita, en iu Vatikana magazeno; ĝi tuj post la falo, dum ĝi estis flotanta sur la lago, estis prenita — kiel rezultas el multaj historiaj dokumentoj — laŭ ordono de Papo Pio VII kaj portita en Vatikanan Florejon (*Florentia*), kie ĝi restadis forlasita kaj forgesita unu plenan jarcenton. En 1904 ĝi estis retrovita de la helpistoj de Apostola Florejo, en angulo de iu magazeno, kaj ĝi estis metata en taŭgan keston, kie ankoraŭ ĝi troviĝas. De la tuta balono restas nur: la interna kovro kaj la reto, ambaŭ kelkloke difektitaj kaj disŝiregitaj; nun, de la antikva beleco kaj riĉeco ekzistas plu nenio. Ĉi tiu praavo de laflugmaŝinoj, de la aerŝipoj kaj de la akvaj-flugmaŝinoj, estas bela memoraĵo kiun Romo devos konservi, ĉar ĝi estas la plej antikva aeronautika restaĵo, kiu ekzistas en la tumondo, unika postvivanto el la epoko de la *montgolfier*'aj balonoj kaj la plej antikva rememoraĵo de l'komencoj de aeronautiko. Laŭ artikolo de prof. P. Emanuelli kompilis W. Donnini

Pri la labirintoj

Unu el la plej gravaj kaj famaj labirintoj estis tiu de Tebo, ĉar la Egiptanoj havis grandan emon al tiaj konstruaĵoj. Herodoto, parolante kiel okulvidinto pri tiu monumento, diras ke ĝi estis vera mirindaĵo. Efektive nur unu murzono enhavis trimil salonojn interkomunikigantajn per sennombraj vojturniĝoj, kaj la supera etaĝo havis 8000 fakojn interkomunikigantajn per tiel kunplektitaj koridoroj, ke estis neeble trairi ilin sen perdi la vojon.

La suba etaĝo estis destinita por la subterigo de la sanktaj krokodiloj kaj de la Reĝoj.

Tiuj ĉi egiptaj labirintoj havis multegajn etaĝojn supre kaj sube kaj grandan kvanton da ŝtuparoj kaj salonoj.

En la insulo Kreto troviĝis ankaŭ granda labirinto konstruigita laŭ la modelo de la egiptaj de la arkitekturisto Dedalo laŭ ordono de la Reĝo Minoso, kiel atestas antikvaj tekstoj.

Tiu ĉi uzo disvastiĝis poste al ĉiuj nacioj precipe al Italujo, Anglujo, Francujo kaj Germanujo: ne plu subteraj sed sur ebenaĵo, ne plu kavernaj sed gajigaj per verdaĵoj kaj floroj, kun fontanoj, statuoj, laŭboj k. t. p.

Laŭ artikolo de G. Gattiglia
en *Primavera Italica* kompilis E. F.

La funebro de Tibetanoj

Tibetanoj havas strangan moron por funebri. Ili ne konas funebrajn robojn, kaj montras sian doloron nur per tre granda kaj speciala malpureco, kiu daŭras cent tagojn. La personoj ĉagrenitaj pro dolora perdo, evitas sin lavi, kaj la vidinoj frotas sian vizaĝon per gluanta miksaĵo, kiu igas ilin naŭzantaj.

esper. A. B. B.

Grava eltrovo por radiofonio

En Usono nova grava eltrovo havis grandan sukceson. Ĝi konsistas el la prisma ringo kiun oni aplikas al la radiofoniaj riceviloj: per tiu ĉi ilo oni povas aŭskulti kaj samtempe vidi.

Oni diras ke ĉi tiun ilon oni eksperimentos okaze de la venontaj olimpiaj ludoj, tiel ke el malproksime oni povos vidi la sunon en la ludejoj kaj aŭdi la aplaŭdojn por la venkantoj.

La eltrovinto estas s-ro Fyenhins el Washington,

Laŭ *Messaggero* esper. A. B. B.

DIVERSAJ OJ

Legendo pri la vinberoj.

Dio Bakuso, ankoraŭ infano, vojaĝis al Nakso, unu el la Cikladaj insuloj.

Ĉar la vojo estis longa, li, laca, sidigis sur ŝtono por ripozi. Ĝetinte rigardon al tero, la juna dio vidis herbon elirantan el ĝi kaj li trovis ĝin tiel bela, ke li pensis tuj ĝin kunporti. Sed ĉar la suno estis tre varma, li timis ke la planto sekigis antaŭ lia alveno: kaj pro tio li enmetis ĝin en osteton de birdo.

En la mano de la dio la trunketo kreskis tiel rapide ke ĝi baldaŭ preterpasis la oston malsupre. Tiam Bakuso, vidante tero oston de leono, pli grandan ol tiu de birdo, enmetis en ĝin la planton kaj la unuan osteton. Sed ĉiam kreskante, la trunko baldaŭ preterpasis ankaŭ la leonoston.

Tiam Bakuso, trovinte oston de azeno eĉ pli grandan ol tiu de leono, enmetis en ĝin la kreskaĵon kun la du aliaj ostoj.

Tiel li alvenis al Nakso. Sed kiam li volis meti la arbeton en la teron, la radikoj tiel forte alligigis al la tri ostoj, ke li devis planti kune la tuton.

La arbedo kreskis rapide: kun granda ĝejo de la dio, ĝi portis mirindajn berarojn. Bakuso premis la berojn kaj faris el ili la unuan vinon, kiun li donis al la homoj por trinki.

Sed tiam mirindaĵo okazis. Kiam la homoj komencas trinki, ili ekkantas kiel birdo. Kiam ili trinkas plue, ili fariĝas fortaj kiel leonoj. Sed se ili ankaŭ plue trinkas, ilia menso malklariĝas, iliaj kapoj malleviĝas; unuvorte ili fariĝas similaj al azenoj.

trad. B. Migliorini

La obstina edzino.

(Flandra rakonto)

Geedzoj enpakigis ion kaj bindis la pakon per ŝnuro. La edzo diris: « Edzinjo, donu al mi tranĉilon por detranĉi ĉi tiun pecon de la ŝnuro. » La edzino havis tondilon kun si kaj diris: « Nu, mi faros tion per mia tondilo. » Sed la edzo respondis, ke la ŝnuro estas tro dika kaj tondilo ne taŭgas por tio. La edzino siallance kontraŭstaris la uzon de

tranĉilo kaj tiel eksplodis diŝputo, kiu pli kaj pli graviĝis. Super ĉio oni aŭdis la voĉon de la virino: « tondilo! tondilo! ». Ĉiam batalante ili ambaŭ alvenis sur la straton, kie fluis rivero. La viro igis tiel kolera, ke li puŝis sian edzinon en la akvon. « Nun ŝi estos certe resanigita de sia obstineco, » li pensis. Sed jen reaperis ŝia kapo super la akvon kaj ŝi ankoraŭ kriis: « tondilo! tondilo! »

Tio transpasis la mezuron! Li prenis longan bastonon kaj puŝis ŝian kapon sub la akvon. Li tiam firme kredis esti liberigita de ŝi. Sed nun ŝi levis sian manon super la akvon kaj kvazaŭtondis per la montra kaj meza fingro. Kiam la viro vidis ke la obstineco de la edzino ne estas forigebla, li eltiris ŝin el la akvo kaj sekigis ŝin en la sunbrilo.

rakontis Jan van Schoor

Militanedoto pri nia Reĝo.

Dun la lasta milito la aŭtomobilo de la Reĝo pasis tre rapide tra iu strato.

Alveninte al iu ponto ĝi devis halti pro signalo farita de karabenisto.

La aŭtomobilo haltis kaj la kondukanto respondis al la karabenisto, ke interne estis la Reĝo.

La soldato ne ŝajnis tro konvinkita kaj sen pluaj ceremonioj li demandis al la kondukanto:

— Montru al mi la paspermeson.

— Mi jam diris al vi ke interne estas la Reĝo mem.

— Se li estas la Reĝo, li certe havas permeson perfekte regulan: mi volas vidi la paperojn.

Rimarkante la longan prokraston, Lia Reĝa Moŝto demandis kio sukcesis kaj la kondukanto rakontis la aferon.

Viktoro Emanuelo III ekridis kaj demandis la karabeniston ĉu hazarde li ne konas sian Reĝon.

— En mia posteno mi konas nur paspermesojn.

La Reĝo tiam elpoŝigis la paperojn kaj ilin montris al la fidela karabenisto, kiu leginte, faris militsaluton respektive kaj iom time.

Viktoro Emanuelo eltiris el skatolo kelkajn cigarojn kaj ilin donis al la karabenisto dirante:

— Bone! faru same ĉiam vian devon.

Li skribis en sian notlibreton la nomon de la fidela soldato kaj rapide forveturis.

Esp. E. Fillipi

Internacia Komisiono por la uzado de Esperanto
Starigita de la III Kongreso de Aera Navigacio
(Bruxelles 1925)

Sekretario: 35, rue du Sommerard, Paris 5.

*Eltirajo el la Raporto prezentita al la III-a
Internacia Kongreso de Aera Navigacio (Bruxelles 1925).*

Ne ŝajnas necese insisti longe pri la maloportunaĵoj, iafoje gravaj, kiuj rezultas, por la aeraj navigantoj el la diverseco de la naciaj lingvoj.

Ili estas kondukataj interrilatiĝi kun fremduloj de plej diversaj naciecoj, kaj en cirkonstancoj, kiuj plej ofte normalaj, povas tamen esti produktataj de navigaciaj okazintaĵoj, kies sekvoj estas tiaj, ke reciproka interkompreno estus plej utila, kaj eĉ evitigus iafoje katastrofojn...

.... Se la naviganta oficistaro, same kiel tiu de la aeraj havenoj, de la oficoj de ĉiuj landoj, scipovus uzi Esperanton, la oficaj interrilatoj treege plisimpliĝus; la pilotoj povus, dum sia transirado, recevi ĉiuspecajn sciigojn de la postenoj lokitaj sur sia vojo; meteorologiaj sciigoj pli detalaj kaj senmankaj povus esti al ili transsendataj; fine la teknikaj ĉiuspecaj dokumentoj, publikigitaj en ĉiuj landoj (mapoj, instrukcioj, k.t.p.) estus disvastigataj netradukite, sekve sen eraro aŭ manko, kaj multe malpli kare ol nun....

Esperanto rimarkinde taŭgas je tiu aplikadotaro. Ĝia logikeco kaj la konstruo de ĝia vortaro konsistigas perfektan teknikan lingvon; ĝia simpleco konvenas al ĉiuj....

Decido alprenita de la Kongreso.

La 3-a internacia kongreso de Aera Navigacio, konsiderante la grandajn servojn, kiujn faras al Aeronautiko la helpa lingvo Esperanto por la internaciaj rilatoj, decidis starigi Internacian Komisionon difinitan por studi kaj proponi la decidoin taŭgajn por enkonduki kaj disvastigi uzon de Esperanto, kiel teknika lingvo en aera navigacio.

Kaj petas S-ojn TORRES Y QUEVEDO, Kolonelo Paul RENARD, Komandanto Emilio HERRERA, Henry KAPFERER, E. ARCHDEACON kaj Sekretarion S-ron ROLLET de L'ISLE starigi ĝin, aligante utilajn kompetentulojn laŭvole.

La komisiono starigita de la III-a kongreso elektis prezidanton Kolonelon Paul RENARD kaj Sekretarion S-ron ROLLET de L'ISLE,

Ĝi turnis sin al ĉiuj aeronautikaj organizaĵoj por ke ili helpu ĝin; ĝi starigis programon de agado, akordigante kun la Esperantista Scienca Asocio.

La teknikaj terminoj de Aeronautiko en Esperanto troviĝas en la aeronautika, *Leksikono en ses lingvoj*, publikigita ĉe la Aeronautika Librejo (Chiron, rue de Seine, 40, Paris).

S-ro ARCHDEACON publikigis en la N-o de Junio 1925 de la *Aeronautika Revuo de Franclando*, organo de la Franca aeronautika Ligo, artikolon titolitan: « Estas necese alpreni universalan lingvon por Aviado kaj T. S. F. ». Sekve de tiu artikolo, multenombraj mendoj por esperantaj libroj alvenis al la *Centra Esperantista Librejo*, 51 rue de Clichy, Paris 9-e.

La Franca teknika Oficejo de Aeronautiko publikigas vortaron de la teknikaj terminoj uzitaj en Aeronautiko en la germana, angla kaj franca linvoj. — Estus facile aldoni Esperanto'n.

ITALA KRONIKO

Genova. Sekve de la ĝenerala ordinara kunido (30-1-1926) la Konsilantaro de la loka Laborista Esperanto-Grupo rezultis jene: S-ro Barni Giovanni, Prezidanto — Zunino Silvio, Sekretario-Kasisto — Polleschi Pietro, Vic-Sekretario — Innocenti Tullio, Bibliotekisto — Bianco Ernesto, Gandini Pietro, Rocca Silvio, Konsilantoj.

— Pro iniciato de Katolikaj Esperantistoj la 6-an de februaro, en preĝejo S. Ambrogio, okazis festosoleno al Kristo-Reĝo, kun parolado en Esperanto de Prof. P. M. Caroli. Plena sukceso.

Mascioni (Aquila). Fondigis « Esp. Laborista Grupo ». En la estraron oni elektis Prez. S-ro Manili Nazareno; sekr. S-ro Adriani; kas. S-ro Artipoli; kons. S-roj Moroni, Di Tommaso kaj Manili Giovanni.

Trieste. Bone sukcesis la unua festo de ĉi tiu jaro kiu okazis la 10-en de Januaro ĉe la Societo « XXX Ottobre ». Oni ludis spritan monologon de sam. Heller « La virino kaj la pluvombrelo » kaj la konatan komedion de D-ro Kav-ro Prof-ro Ghez. « Vi sola, Esperanto, povas fari tiajn miraklojn ». Fine sam. Carlini prezentis siajn magiajn ŝercojn. La bela vesperado finis per komuna vespermanĝo ĉe la restoracio « Cozzi ».

La Grupo translokigis sian sidejon al Via Cesare Battisti 10 ĉe lernejo « Battisti ».

Presejo de « Itala Esperanto Revuo » - S. Vito al Tagliam. A. Paolet, dir.-resp.

Gli Amici dell' « ITALA ESPERANTA REVUO » nel 1926 — VI. Elenco

251. Giocoli prof. dott. Giuseppe Rag. Capo della Prov.	POTENZA	276. Gabinetto di Lettura Piazza Garibaldi	PADOVA
252. Montella dott. Giulio Segretario Intend. di Finanza	POTENZA	277. Biblioteca della Università Popolare Piazza Unità d'Italia	PADOVA
253. Bochiechio sig. Giovanni Vico Cardasco	POTENZA	278. Bonardi P. Giovanni Istituto Missioni Estere	PARMA
254. Labella dott. Matteo	POTENZA	279. Sezione Pisana dell' Istituto Toscano d' Esperanto - Luugarno Regio 17	PISA
255. Tedeschi sig. na Lucia Via S. Bonaventura	POTENZA	280. Chiarini sig. Arseno - p. Famiglia Globbi Via Quirico Filopanti 3 (Porta Pallio)	VERONA
256. Fiorentino sig. Fiorentini, hotelisto (Livorno)	CASTIGLIONCELLO	281. Ravanelli P. Silvio (Verona) S. GIULIANO DI QUINZANO	
257. Cappabianca rag. Fortunato Sec. Mov. FF. SS., Via de' Cesari 16	NAPOLI	282. Rizzo sig. Pietro SS. Trinità 62	CATANIA
258. Nigri sig. Renato, fotografo Piazza Vitt. Em. 29	LIVORNO	283. Fontana sig. Osvaldo Via G. B. Monti 30-4	SAMPIERDARENA
259. Loschi Contessa sig. a Maria A. Via Balbo 43	ROMA	284. Zaccchè sig. Fernando Via Salita 13	MANTOVA
260. De Rossi sig. Renato Via dell' Arringo 16	TERNI	285. Fiori sig. Giuseppe Corso Vitt. Em. 42	MANTOVA
261. Blasimme rag. Ascenzio Viale della Regina 85	ROMA 34	286. Morfini sig. Gerardo Via Tazzoli 4	MANTOVA
262. Pantaleone sig. Francesco Via Roma 178	PALERMO	287. Papa dott. Francesco Intend. di Finanza	MANTOVA
263. Baletti don Arrigo Via Benacense 15	BRESCIA	288. Bonventi sig. Adamo Vicolo di Mezzo 1	MANTOVA
264. Rangone sig. Francesco Via Galliera 137, 10/a	BOLOGNA	289. Gruppo Esperantista - p. sig. Luigi Topi Via F.lli Bandiera 1	LA SPEZIA
265. Remotti sig. Secondo Via Marsala 8	VOGHERA	290. Gagnotto ing. Luigi, Magg. G. N. Viale Garibaldi 3	LA SPEZIA
266. Cattaneo prof. Paolo Via Solferino 15	PADOVA	291. Topi sig. Luigi Via F.lli Bandiera 1	LA SPEZIA
267. Minnaia sig. Luigi Via Calatafimi 10	ROMA 21	292. Topi sig. a Adriana Via Carducci 3	PISA
268. Cerri sig. Corrado Via Isonzo 12	AREZZO	293. Orengo ing. Rinaldo Via Manzoni 3	LA SPEZIA
269. Preti prof. rag. Enzo Via Farini 83	PARMA	294. Migliorini prof. Bruno Via Aless. Poerio 29	ROMA 44
270. Fogliacco sig. Carlo Via Nizza 12	TORINO 6	295. Migliorini dott. Elio Via Aless. Poerio 29	ROMA 44
271. Flandra sig. Pietro Via Nizza 124	TORINO 6	296. Piscini dott. Urbano Viale del Re 24	ROMA
272. Fresco sig. Francesco Via Luigi Pantini 7	ROMA 14	297. Barberi comm. Francesco Via S. Nicolo da Tolentino 21	ROMA 5
273. Caico sig. Federico Via Isidoro Carini 62	PALERMO 36	298. Fabbri sig. na Giacinta Via S. Maria in Monticelli 67	ROMA
274. Poleschi sig. Pietro Via della Libertà 15	GENOVA 13	299. Natalucci sig. na Agnese Via Calamatta 32	ROMA 26
275. Rao sig. Umberto Via Varese 46	ROMA	300. Andreola sig. na Amina Via Forb 26	ROMA

301. Rosa sig. Giuseppe Maria V. Principe Umberto 115	ROMA 28	326. Cappellini sig. Giuseppe Via Diritta 3	CREMONA
302. Antonelli sig.na Adelaide Viale Angelico 65	ROMA 48	327. Biblioteca del Gruppo Esperantista Via Macello	CREMONA
303. Pioppa prof. Pietro Viale Liegi 7	ROMA 36	328. Degasperi sig. Luigi Vela 15	TRENTO
304. Vanghetti ing. Uberto Via Capo le Case 18	ROMA	329. Nesler dott. Augusto Palazzo Provincia	TRENTO
305. Leonardi sig. Leonardo - Barriera Nomentana	ROMA 37	330. Bond rag. Michele Cassa di Risparmio	TRENTO
306. Scibelli dott. Ettore Viale della Regina 89	ROMA	331. Eberle rag. Cesare Cassa di Risparmio	TRENTO
307. Palma sig. Giuseppe Via Anapo 10	ROMA 36	332. De Tanis sig. Leo Piazza Leonardo da Vinci 3	TRENTO
308. Porta sig. Druso - Via Moncenisio Villino 115 (Città Giardino Amiene)	ROMA	333. Trombetti rag. Mario Via Quintino Sella 41	ROMA
309. Di Demetrio prof. arch. Francesco Via Zara 219	ROMA 27	334. Società del Casino Pedrocchi	PADOVA
310. Bressan sig. Bartolo (Vezzano di Trento)	FRAVEGGIO	335. Sorace sig. Paolo Viale G. Cesare 71	ROMA 33
311. Stacul maestra Angela p. Albergo Vittoria (Ven. Giulia)	SAGRADO	336. Bronchi prof. A. Casella Postale 39	VICENZA
312. Bonfiglioli sig. Umberto Via Osti 1	MILANO 5	337. Campesan sig. Luigi Piazza Vitt. Em. 12	VICENZA
313. Giordani rag. Celeste Borgo Sorgo 11	PARMA	338. Tomasini sig. Angelo Direz. Dazio - Municipio	VICENZA
314. Ferrari sig.na Bice Corso Vitt. Em. 10	MANTOVA	339. Pasce M. Ettore Via Cesare Cabella 22/12	GENOVA 2
315. Martini sig. Giuseppe Villa Drago Via dei Rivali 21 (Genova)	BOLZANETO	340. Ivaldi sig. Agostino Via Albaro 8/12	GENOVA
316. Vangelista sig. Johano RR. Poste	VICENZA	341. Unia sig. Giacomo Ottavio Via Garibaldi 9	TORINO 8
317. Stocchiero sig. Giuseppe Via G. Lombroso, Strada Braga	VICENZA	342. De Bonis sig.na Elsa (Cremona)	CASTELLEONE
318. Palumbo barone ing. prof. Alberto Via Foria 234	NAPOLI	343. Lantero sig. Giovanni Via Reg. Margh. 6-9 (Genova)	BOLZANETO
319. Guindani sig.na Rita Via Sopramuro 1	PIACENZA	344. Bianchi ved. Gisella Via Carlo Botta 7	TORINO 9
320. Signorini prof. Giuseppe Via Bufalini 1	FIRENZE	345. Košuta sig. Viktor (Brivee) S. CROCE DI TRIESTE	
321. Segre sig.na Vittoria Corso Torino 53-10	GENOVA	346. Catorzi sig. Gino (Firenze)	SIGNA
322. Torre rag. Pietro Via S. Lorenzo 15	GENOVA	347. Lainati sig. Giancarlo Foro Bonaparte 3	MILANO 9
323. Luise sig. Pietro	COSENZA	348. Bianchetti sig. Egidio Via Corio 1	MILANO
324. Gruppo Esperantista Via Farini 86	PARMA	349. Trevisan sig. Alberto Viale S. Maria del Carso 95	MILANO 24
325. Mandelli rag. Aldo Via Macello	CREMONA	350. Caruso sig. Spazzino (Firenze)	MONTELUPO FIORENTINO

Cesare Botticelli

INDUSTRIO KAJ FABRIKO
DE

Veneciaj "Conterie,, (Perloj)

VENEZIA - Via 22 Marzo N. 2242
TELEF. 2716

Speciala fabriko de
PERLAJ MANPOŝOJ POR SINJORINOJ
KOLĈENOJ KAJ BRAKĈENOJ
VENECIAJ GRAVURITAJ LEDAĴOJ
KAJ MOZAIKOJ

MODERAJ PREZOJ

ONI KORLESPONDAS ESPERANTE

Liveranta Fermo de Esperanta Komercista
Fermo en Dresdeno

MOLTI SAMIDEANI non hanno ancora rinnovato il loro abbonamento alla Rivista. Li preghiamo vivamente di farlo SUBITO per non avere interruzioni nella spedizione.

SAREMO PURE GRATI a tutti coloro che ci trasmetteranno indirizzi di simpatizzanti o di persone che s'interessano del nostro movimento, alle quali spediremo numeri di saggio della Rivista.

La 7 aprilo 1926, vespere de 9 ĝis 11 h.

la nova kaj forta sendstacio RADIO BARCELONA (ondlongeco 325 m.), aŭdebla en tuta Eŭropo, dum du horoj dissendos sekvantan programon en Esperanto:

- Poemoj (recititaj de diversaj gekursanoj).
- Kantoj el la kantrezoro de diversaj nacioj (f-no Katellvi).
- La "Espero" kaj la "Vojo" (ludataj de orkestro).
- Paroladoj (D-ro Bartomeu kaj Prof. Domenek).
- Disaŭdigado de la voĉoj de la Majstro D-ro Zamenhof kaj de D-ro Bourlet, konservitaj sur fonografaj cilindroj.

Ĉiu samideano, kiu estos bone aŭdinta, bonvolu sendi poŝtkarton al Radio Barcelona.

B. kaj E. MIGLIORINI

Esperanta Legolibro

Volumo de 144 paĝoj dividitaj en tri partoj:

I. TRA LA VIVO — II. TRA LA LINGVO — III. TRA LA LITERATURO

JUĜOJ DE LA GAZETARO

Ni ne mankas je bonaj legolibroj; la aparta gusto de iliaj aŭtoroj montriĝas en la elekto de la tekstaro; tiun de B. kaj E. Migliorini, mi komparas kun la bonega unua legolibro de Kabe pro la varieco kaj intereso de l'enhavo: anekdotoj, legendoj, studoj pri lingvo, stilo aŭ esperantismo, elĉerpajoj el fremdaj literaturoj, kelkaj poezioj inter la prozaĵoj. Vere la elekto estas tute taŭga kaj la legolibro certe estos inter la plej ŝatataj de lernantoj.

G. S. en *Esperanto* de U.E.A., nov. 1925.

Ekzistas ja jam sufiĉe da legolibroj, mi konstatas, kaj ĉiu lando deziras havi sian propran — tio ja estas fakto kompreninda. Legolibro feliĉe estas uzebla en ĉiu ajn lando alilingva, do ankaŭ ĉi tiu nova eldonaĵo itala. Ĝi estas inda, la enhavo zorge elektita, kaj tio estas la ĉefaĵo. Mi legis partojn tie kaj tie ĉi kaj povas konfirmi, ke la presitaj artikoloj ktp. estas ĉiuj bonstilaj kaj modelaj (de Zamenhof, Cart, Privat ekz.) kaj per tiu ĉi fakto tre bone servos al la legantoj ĉu izolitaj, ĉu en grupoj. Mi urĝe rekomendas ĉi tiun novaĵon ankaŭ al la ne italoj kaj ĝojas, ke ĉi tiu verko zorge kunmetita estas inter la Esperantaĵoj.

Charlotte Pülcers, Basel, L. K., en *Marto*, dec. 1925.

La libro konsistas el tri partoj. La unua parto (Tra la vivo) enhavas mallongajn, kaj

facilajn legaĵojn. La dua (Tra la lingvo) pri-traktas lingvajn kaj historian demandojn kaj la tria (Tra la literaturo) kunkolektas mallongajn literaturaĵojn de famaj nuntempaj samideanoj. La hungaranojn inde reprezentas Kalocsay kaj Baghy. Ni ĝojas, ke la vico de legolibroj pliriĉiĝis kun tiu ĉi vere valora libro.

Hungara Esperantisto, januaro, 1926.

La libro enhavas multajn tre oportunajn legaĵojn por la konversacioj en la kursoj. Tial oni ankaŭ rekomendas ĝin al niaj kursgvidantoj, al kiuj ĝi liveros interesan kaj uzeblan materialon.

Konkurto, dec. 1925.

A collection of carefully graduated anecdotes, proverbs and literary extracts generally, for the most part taken from the best Esperanto authors, for the student. For example there are articles from the pen of the author of Esperanto, poetry by Kalocsay, Bicknell, Grabowski, discussions on the language by Privat and others, a polemic from Kotzin, and so on, with something to please every taste.

One of the best books for the purpose we have seen.

International Language, marto 1926.

La libro estas bone kunmetita kaj donas bonelektitan aron da tradukaĵoj el plej diversaj lingvoj.

Der Arbeiter-Esperantist, dec. 1925.

Prezo de la volumo: Italio L. 4 — Eksterlande L. 5.

Mendojn al la eldonanto A. PAOLET en S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italio)

Per acquisti di materiale di studio e di propaganda
rivolgersi all'Editore A. Paolet in S Vito al Tagliamento (Friuli)